ı Jaro
ꞁro 4/5 (20).
Decembro 1929.
...eras dumonate.

1812
1.12.29
C. VANBIERVLIET · URBA PUBLIKA BIBLIOTEKO · KORTRIJK · ESPERANTO · DONACO

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

ꞁONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

---

Redaktoro: WILHELM SOLZBACHER.

ꞁNHAVO:

**Wilhelm Solzbacher,** Dek Jaroj. — **A. Björnstad,** Katolika Junularo en Norvegujo. — **Walter Mudrak,** Apostolo de Laboristoj. — Granda Festo en Saint-André **W. S.,** Internacia Junulara Agado, I. — La Centra Estraro de la Ĥina Katolika Junulara Asocio. — **Peter Klein,** La Antaŭkongreso de MOKA en Torino. — **La VI-a Internacia Kongreso de MOKA en Barcelona** (Gia karaktero — raporto pri ĝiaj laboroj — uzo de Esperanto — decidaj kaj rezolucioj). — **M. Bajez-Leopold Lackner,** Sabro kaj Pafilo. — **Jubilea Kolekto por J. B.** — **Nia movado.**

**Bildoj**: Bapto de ĥinaj studentoj en Saint-André — La estraro de la Ĥina Katolika Junulara Asocio.

REDAKCIO: **Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.**

ꞁonejo: ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
ꞁRL i. Westf., Hellweg 34, Germ. Eldonejestro: August Günther.

# Abonprezoj de “ La Juna Batalanto „

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3.40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3.50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0.75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 14 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1.20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4.50 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos nian jarlibron kaj aliajn publikigajojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj* : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA, kies adresojn vi trovas en alia loko de la gazeto.

*Poŝtkontoj*. Germanujo : Dortmund 24792 (August Günther, La Juna Batalanto, Werl); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine) : Aŭstrujo : Wien D 30461 (Ernst Gœrlich, Wien 3).

**POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN** en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvajn. Il devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. La propaganda eldono B (eldono A aperas en formo de revuo) kostas nur **po 3 fenigojn**; sed oni forsendas nur minimume 25 ekzemplerojn. Mendu !

« **JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » **estas** destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** po 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

**En angla kaj hispana lingvoj** similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.



# DEK JAROJ

Nia movado festas jubileon.

Antaŭ dek jaroj, en la numero de decembro 1919 de la gazeto « Blanka Kruco », kiu jam meze en la milito (1918) estis fondita kiel organo de la katolika Esperanto-kaj paco-movado (la redaktejo estis en Breslau, la eldonejo en Graz), aperis la unua alvoko por la fondo de Mondjunularo Katolika, subskribita de la Breslaŭa teologia studanto E. Piekonz.

« La grandeco de la tempo, kiun ni travivas, alvokas nin kun admonanta voĉo : Leviĝu! Agu! Ni staras sur la ruinoj de pasinta epoko, sed jam anonciĝas nova tempo!

Antaŭ nelonge la franca socialista ĵurnalo « Humanité » publikigis alvokon al la studentaro de la tuta mondo, ke ĝi komencu internacian ideinterŝanĝon kaj realigu la spiritan interfratiĝon de la homaro. Ĉu tiuj agadu, dum kiam ni eterne restadas en la stato de hieraŭ ?

Ĉu ni ne estas katolikoj, kiuj devus senti kaj pensi universale? Ĉu nia Dia majstro ne donis al ni la ordonon de la amo? Se tiu amo estas vivanta en ni, se ni estas ne nur aŭskultantoj, sed realigantoj de la vorto, tiam tiu amo pelos nin al interkompreniĝo kun niaj naciaj najbaroj, des pli, ĉar la malamo inter la nacioj ne volas ĉesi...

La solvo de la internaciaj taskoj, kiu estas postulata de nia tempo, estas neebla sen internacia helplingvo : ESPERANTO. Pacifistaj revoj ne sufiĉas; estas necese praktike labori por la repacigo de la mondo per la disvatisgo kaj la uzo de nepre necesa helpilo de la interkompreniĝo, de interkompreniga lingvo... »

Ni citis nur kelkajn frazojn el la alvoko, kiu en la energiaj vortoj de la postmilita generacio en du lingvoj (Esperante kaj germane) vokis al agado.

La sama numero de « Blanka Kruco » jam faris tre praktikajn proponojn. Ĝi enhavas artikolon verkitan de WALTER MENZ « Esperanto en la katolika junulara edukado ».

Dek jaroj estas pasintaj, jaroj de senfina agado, movado, batalado, jaroj de malhelpoj, malfacilaĵoj, malsukcesoj, — sed ankaŭ jaroj de forto, ĝojo kaj beno.

MOKA vivas ankoraŭ. Al ĝi lumas la samaj steloj kiel al ĝiaj unuaj pioniroj, ĝi iras la saman vojon, ĝin antaŭenpuŝas la samaj fortoj.

Ĝojo kaj granda danko al Dio nin movas en nia jubileo. Ĝi al ni ne estas okazo por ripozi, sed nova alvoko al agado.

Kaj ankaŭ la pli detalan priskribon de nia historio ni volas ankoraŭ iomete prokrasti, ni pripensas eldonon de speciala broŝuro pri tio.

Ni ankaŭ atentigas pri nia Jubilea Kolekto por La Juna Batalanto, anoncita en ĉi tiu numero. Ne forgesu ĝin!

Kaj en ĉi tiu tago ni ĉiuj volas promesi fidelecon, kuraĝon kaj konstantecon — ne al iu homo, sed al la voko de Dio! Ke la Sankta Spirito venu al ni ĉiuj kaj restu ĉe ni por eterne !

Wilhelm SOLZBACHER.

## Katolika Junularo en Norvegujo

Via admono, skribi ion pri la norvega junularo por LA JUNA BATALANTO, estas por mi granda plezuro kaj honoro, sed bedaŭrinde nur estas malmulte sciigota pri tiu temo.

Norvegujo estas misia lando kaj havas nur proksimume 2500 katolikojn.

En du urboj, la ĉefurbo Oslo kaj Bergen, ekzistas malgrandaj katolikaj junulunuiĝoj.

La katolika junula grupo de Oslo, kies nomo estas Sankta-Aloizio-Unuiĝo, fondiĝis en la jaro 1903 kun kelkaj membroj.

Tiam pastro (nun Monsinjoro) Kjelstrup funkciadis kiel unua direktoro. En Januaro 1928 tiu unuiĝo festis sian 25-jaran jubileon, en kiu ankaŭ la antaŭaj membroj partoprenis.

Nun ĝi havas 22 enskribitajn membrojn, krome kelkajn knabojn, kiuj ankaŭ partoprenas en la kunvenoj. La nuna direktoro estas la norvega pastro Sund, kiu baldaŭ transloĝos al Bergen. En la kunvenoj, kiuj okazas ĉiun duan dimanĉon vespere, estas paroladoj, diversaj ludoj kaj komuna manĝado.

Okazas kelkaj komunaj komunioj dum la jaro. Somere oni aranĝas ekskursojn. Ankaŭ estas eldonata manskribita unuiĝa gazeto, kiu nomiĝas « La Dekkvarposteno ».

Simila junulunuiĝo en Bergen havas ĉ. 10-12 membrojn.

En Oslo ankaŭ ekzistas Marianaj Kongregacioj por virinoj, junulinunuiĝo, kaj ankaŭ unu unuiĝo por knabinoj kaj unu por knaboj.

La celado de tiuj unuiĝoj estas, kunigi la katolikan junularon por gardi ĝin en la granda danĝero, vivadi en nur protestanta ĉirkaŭaĵo, kaj ankaŭ, servi kiel instigilo al pli pura kaj pli bona katolika vivo.

**A. Björnstad**, Oslo.

## APOSTOLO DE LABORISTOJ

La 15-an de septembro nunjara la Kongregacio por la Kristanaj Laboristoj (Kalasantinoj) en Vieno profunde funebris pri la morto de sia granda, sed modestega fondinto kaj unua general-superioro, Pastro Anton Maria **Schwartz.** Tiun funebron partoprenis krom la ĝeneralaj katolikaj rondoj Vienaj kaj aŭstraj precipe aregoj da kristanaj laboristoj kaj metilernantoj, al kiuj la kara mortinto estis prizorgema spirita patro.

En la lastaj du jardekoj de la pasinta jarcento, do en tempo, kiam materialista, senskrupula, nur profitcelanta **kapitalismo** ankaŭ en Aŭstrujo ĉiam pli progresis, kiam la fendo inter kapitalistoj posedantaj, regantaj unuflanke kaj laboristoj ekspluatataj, ĉiam plimizeriĝantaj aliflanke ĉiam kreskis, kiam **oni en katolikaj rondoj la socian problemon bedaŭrinde sufiĉe malzorgis,** la granda mortinto estis unu el la malmultaj pionioj, kies voĉo (bedaŭrinde multioke ne aŭdata) vokis la kristanan popolon al la urĝanta socia laboro.

Unue li laboris inter la laborista junularo, fondante katolikan unuiĝon de metilernantoj. Kaj el ĝi la tuta agado mirinde elkreskis. Post kelkaj jaroj li fondis sian kongregacion, kies komenco estis ankoraŭ tre modesta. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj li ne senkuraĝiĝis, ne laciĝis en sia laborado laŭ lia ĉiama devizo : « Ni fidu je la Sinjoro! »

Nuntempe sufiĉnombra pastraro kaj laika frataro de la juna kongregacio agadas en la centrejo kaj filiaj domoj en Vieno koj la provinco, depost kelkaj jaroj eĉ en Budapest, kaj krom monaĥejo kaj preĝejo salonegoj por studado, legado, teatro-, muzik- kaj filmprezentado, internato (heimo) por metilernantoj servas al la bonfarto de kristanaj laboristoj kaj lernantoj.



**Granda Festo en la Benediktana Abatejo Saint-André — — (Belgujo) — —** okazis la 8 septembro 1929. Kvar ĥinaj studentoj antaŭe idolanaj tie estas baptitaj de la Abato Dom Theodor Nève. Ĉiuj kvar havis la saman baptopatrinon : S-rinon Firmin Lebbe, patrinon de Patro Lebbe C. M., la granda «apostolo de Ĥinujo», fondinto de la Katolika Ĥina Junulara Asocio en Eŭropo, kiu ankaŭ al ni estas tiom kara. Laŭ malnova kristana kutimo la baptitoj portis sian blankan veston dum tuta semajno. Iliaj nomoj (de maldekstre) : André Chen, Bernard Chang, Jacques Yuann, Jean Pei.



Por ni speciale grava estas ankoraŭ la ĝojiga fakto, ke pastro generalo Schwartz estis **granda favoranto kaj subtenanto de Esperanto.** Li en paroladoj kaj eĉ predikoj ĉiam denove akcentis la signifon de la internacia lingvo Esperanto por la katolikaro. Depost 1922 en « Calasantinum » (domo de la Kalasantinoj) okazas ĉiujara Esperanto-kurso, nuntempe gvidata de la fervora agema frato Villanova.

Per pia preĝo kaj senlaca laboro ni katolikaj Esperantistoj inde honoru la memoron de tiu granda laborista apostolo !

**Walter Mudrak, Wien** (eksinternatano de « Calasantinum »).

## INTERNACIA JUNULARA AGADO

Je la fino de la jaro ĉi tiu artikolo volas provi, doni en sistema ordo superrigardon pri la internacia junulara agado en la plej malsamaj sferoj. Ĝi volas montri la nunan staton laŭ la lastaj evoluoj. Sed ĉar la nombro de tiuj internaciaj junularaj asocioj estas pli ol 50, ĉio devas esti raportata en plej granda mallongeco kaj koncizeco. Mi ja ne bezonas aldoni, ke la scio, kiel la « aliaj » internacie agadas estas de plej granda intereso kaj graveco por ni katolikoj.

**1. Socialista Junularo.**

La **Socialista Junulara Internacio** okazigis la 13—14 julio en Wien internacian socialistan junularan renkonton, kiu devis manifestigi la forton de la movado. Pli ol 50 000 gejunuloj marsis en la festa irantaro. Poste (16—18 julio) okazis la 3-a internacia socialista junulara kongreso. SJI havas 220 000 membrojn en 27 landoj, preskaŭ ĉiuj estas eŭropanoj. La sola ekstereŭropa asocio aliĝinta, nome la armena, estas reprezentata per elmigrintoj en Eŭropo vivantaj, ĉar en Soveta Armenujo la Marksista Junulara Asocio estas malpermesita. La francaj kaj anglaj sekcioj de SJI estas treege malgrandaj. La Viena kongreso akceptis interesan programon pri junulara protekto, okupiĝis pri la milita kaj senarmiga problemo kaj pri la kunlaboro kun aliaj internacioj. Ankaŭ okazis potenca Esperanto-demonstracio. Kiel prezidanto de SJI estas elektita Karl Heinz (Wien), sekretario restas Erich Ollenhauer (Berlin).

**La Internacia Socialista Studenta Unuiĝo** fondita 1921 en Amsterdam ankaŭ kongresis en Wien kaj elektis 4 laborkomitatojn pri diversaj aferoj. Ĝi nun enhavas 12 naciajn asociojn kun 8 000 membroj.

**La movado de la «infanamikoj»** nun estas propagandata en ĉiuj landoj. Diversloke oni starigis grandegajn libertempotendarojn nomatajn «infanaj respublikoj».

**2. Komunista Junularo.**

**La ruĝaj pioniroj** kongresis en Moskva, ĉeestis 7000 delegitoj el multaj landoj, eĉ el Azio, Afriko kai Ameriko. Entute nun en ĉi tiu komunista infana kaj skolta movado estas organizitaj 2 milionoj da infanoj, la plejmulto kompreneble en Rusujo. Ili formas 50000 grupojn. En Rusujo la asocio ekzistas de 7 jaroj, la gvidantoj venas el la komunista junulara asocio Komsomol. La vivado estas skoltsimila kaj havas multajn interesajojn por la pedagogo. El unue revolucia organizajo fariĝis konservativa (en la senco de la nuna rusa sistemo) asocio. Ekz. por ĉi tiu jaro la ĉefa tasko nomiĝas : progresigo de la bredo de kortbirdaro en Sovetujo. La infanoj en siaj grupoj ĉiam denove estas atentigataj, ke ili admonu siajn gepatrojn en tiu senco, kaj oni diras — ne ekzistas kaŭzo, por ne kredi tion —, ke tiu metodo bone sukcesas.

**La Komunista Junulara Internacio** estas, speciale pro la granda rusa asocio Komsomol kaj la ekstereŭropaj sekcioj, multe pli multnombra ol la SJI. En la lasta jaro ŝajnas esti okazintaj gravaj ŝanĝoj, ekz. en Germanujo per la partio kaj la Internacio la tuta estraro de la junulara asocio estas eksigita. «Batalo kontraŭ la kaŝita oportunismo de la gvidantoj», estis la tasko, kiel ni legas en interesa artikolo de Ruth Kahn en « Die Internationale ».

**3. Libersocialista Junularo.**

La Ligo de Revolucia-Socialista Junularo en Svisujo (estiĝinta plejparte el la antaŭa«Freibund»), la Ligo de Libera Socialista Junularo de Germanujo kaj kelkaj similaj grupoj de aliaj landoj (ekz. Francujo) asociiĝis, ĉefe sekve de internacia kunveno sur la Habsburg (Svisujo). La asocioj laŭnombre ne estas fortaj, sed montriĝas tre aktivaj. De tempo al tempo oni vidas gvidantojn eksiĝi, por eniri en la komunistajn partiojn, kiuj ofte per tio ŝajnas ricevi membrojn (speciale intelektulajn) de siaj opozicioj.

**4. Sendependa-Socialista Junularo.**

Ankoraŭ ekzistas Internacia Ligo de Sendependaj Socialistaj Junularoj kiu iam estis tre grava kaj potenca. Nun ĝi nur plu enhavas restajojn, ekz. la Socialistan Proletarian Junularon de Germanujo kaj ne malgravajn grupojn en Francujo, Litovujo kaj (sekrete) en Italujo.

**5. Anarkiista Junularo.**

**La Anarkiista Junulara Internacio** (sekretariejo en Amsterdam), eldoninte de longa tempo sian Internacian Informservon en Esperanto (nun **nur** en Esperanto) de decembro 1929 reeldonas la Esperanto-gazeton monatan «Libera Laboristo» kiel sia oficiala organo. La sekretariejon gvidas H. Stevens, Jo de Wit kaj L. van Trotsenburg. Oni aranĝis tre interesan ronddemandon inter la membroj de la aliĝintaj asocioj pri la kunlaboro en la junulara sekcio de la Ligo kontraŭ Imperialismo. Kelkaj respondoj estis jesaj, aliaj neaj pro la hegemonio de la komunistoj en tiu movado.

**6. Antiimperialista Junularo.**

Okaze de la dua kongreso de la Ligo kontraŭ Imperialimo en Frankfurt (fine de julio) okazis la unua internacia antiimperialista junulara konferenco. Ĝi estis bone vizitita speciale ankaŭ de delegitoj de junularaj asocioj el koloniaj kaj subpremitaj landoj. La movado ŝajnas esti veninta sub la gvidadon de la komunistoj, kvankam ankaŭ burĝaj, socialistaj kaj anarkiistaj organizajoj kunlaboras. Estas tre bedaŭrinde, ke tiel la eksterEŭropa junularo laboranta en la Ligo troviĝas sub tute unuflanka influo.

**7. Radikala kaj liberala junularo.**

Por 21—24 novembro estis invitita al Berlin internacia konferenco de la junularaj sekcioj de radikalaj kaj liberalaj- demokrataj partioj. El 15 eŭropaj landoj partoprenantoj estis aliĝintaj. (Daŭrigota).





LA CENTRA ESTRARO DE LA ĤINA KATOLIKA JUNULARA ASOCIO.

**— En la dua vico, meze, P. DE JONGHE, Ĝenerala Direktoro. — En la unua vico (kun ĉapelo en la mano) TCHENG SCHJIE TSIENG (el Tientsin), prezidanto; maldekstre de li TCHENG SHIAN TSUNG (el Chekiang), sekretario ; — en la dua vico, dekstre de la prezidanto, PASTRO LY TAO NAN (el Hankow), eklezia konsilanto ; maldekstre de li SU TSING HIEN (el Changsi), vicprezidanto.**

La 19 majo 1929, en la alta festo de pentekosto, okazis en **Peiping** la unua kunsido de la komitato de la Ĥina Katolika Junulara Asocio, pri kies fondo kaj statutoj ni jam publikigis originalajn informojn de nia ĥina MCKA-sekretario. Ĉeestis proksimume 120 personoj, kaj Lia Ĉefepiskopa Moŝto **Msgr. Costantini** mem prezidis kaj faris paroladon, el kiu ni citas malgrandan parton :

« Bone oni elektis la pentekostan tagon, por oficiale fondi vian Asocion. Tiel ĝi estas metata sub la aŭspicojn kaj la gracon de tiu granda liturgia, festo de la Dia Amo, konsakrinta la aŭroron de la kristana apostolado, tago de la sankta fajro, tago de la kristana kuraĝo, tago de tiu Dia libereco, « qua Christus nos liberavit » (« per kiu Kristo nin liberigis ». Galat. III, 31).

Se la apostoloj estus nombrintaj sin, elirante el la Vespermanĝa Salono, ili estus trovintaj sin dekdu homoj. Sed ili ne nombris, ĉar la kuraĝo, per kiu iliaj koroj brulis estis sen limoj kaj sen fino, forta por gajni la tutan mondon.

Vi, miaj karaj junuloj, estas malmultnombraj ; sed ne nombru vin, ĉar ankaŭ vi sentas bruli en vi la amon de Kristo, la fajron de la Sankta Spirito.

Feliĉaj vi estas, ĉar vi havas grandan idealon, idealon, kiu batigis la korojn de la apostoloj.

Feliĉaj vi estas, junuloj, ĉar vi estas vokitaj, por helpi konstrui la Eklezion en Ĥinujo.

Al vi trans la marojn la Sankta Patro parolis tiun vorton de simpatio kaj kuraĝigo, kiu montras al vi same la grandan devon, alporti vian helpon al la reviviĝo de via patrolando.

La Sinjoro vokis vin al malfacila, sed belega tasko : kunlabori kun la episkopoj kaj misiistoj por la disvastigo de sia Regno, kiu, kiel, en Okcidento, kunportos ankaŭ la plej valoran subtenon por la socia reviviĝo de la popolo kaj por la bonfarto de via patrolando...... ».

# LA ANTAŬKONGRESO DE MOKA EN TORINO

Kvindek partoprenintoj de nia kongreso en Barcelona vizitis antaŭ la kongreso la centron de la Salesanoj en Torino (Italujo), por studi la aranĝaĵojn de ĉi tiu ordeno kaj por pritrakti *misiajn taskojn de la junularo* kun ordenanoj. Dank' al la fervora kunlaboro de nia samideano J. M. Puiŝys, kiu bonege aranĝis gvidadojn kaj kunvenojn, la vizito en Torino havis sukceson. Pri la aranĝoj jenon :

Alveninte en la ĉefstacidomo en Torino la karavano estis akceptata de reprezentantoj de la *Torina Esperanto Asocio*, de la *Salesanoj* kaj de la *katolika junulinasocio*. Post loĝigo de la junuloj kaj pastroj en la domo de la Salesanoj, de la junulinoj ĉe la fratulinoj, la gesamideanoj vizitis en kelkaj grupoj la urbon, gvidite de Torinaj Esperantistoj. Sekvantan matenon (20-an de Augusto) la ĉefrektoro de la institucio Salesana akceptis la pastrojn kaj reprezentantojn de la katolikaj junulasocioj en la karavano en privata aŭdienco, kvankam malsaneco devigis lin resti en lia ĉambro. En la interparolado, kiu helpe de nia lingvo estis laŭ la cirkonstancoj tre flua, li esprimis sian simpation por Esperanto kaj promesis sian helpon en nia misia laboro, precipe en starigo de helpservo por la internacia korespondado de misilandanoj. — Rigardinte la diversajn instituciojn de la Salesanoj la gekongresanoj posttagmeze vizitis la monton Superga kun la tomboj de la reĝa familio de Savoio. En *kunveno, prezidita de Lia Episkopa Moŝto Mons. Oktavio Ortiz Arrieta el Chachapoyas (Peru)* kaj vizitita de Salesanaj pastroj kaj la kongresanoj, oni pritraktis detale la taskon nuntempan de la katolika junularo en la misia laboro, precipe la kreadon de internaciaj rilatoj inter la junularo en okcidentaj ŝtatoj kaj la samkreda junularo en misilandoj, unuflanke por montri al la junularo en katolikaj landoj la kulturan staton de la katolika junularo en la civilizitaj misilandoj (Ĥinujo, Japanujo ktp.) kaj tiamaniere veki kaj plifortigi la intereson por la katolika misilaboro, aliflanke por konatigi al la misilanda junularo la kulturan staton de la okcidentaj landoj. Oni konkludis ke tiamaniere la nepre reviziota opinio de la katolika popolo en ĉiuj okcidentaj ŝtatoj pri la misilaboro en civilizitaj paganlandoj fariĝos pli favora al la nuntempaj taskoj de la katolikaj misiistoj, al jenaj taskoj, kiujn nia Sankta Patro esprimis en siaj misiaj enciklikoj, kaj adaptas al la vekiĝanta nacia sento, kiun ni povas konstati en multaj misilandoj. Alie oni opiniis, ke la misilanda junularo pli ekkonas la universalecon de nia sankta eklezio kaj ankaŭ povos konstati la novan movadon en la katolika okcidenta junularo tre favora al ili (vidu J. B. paĝoj 10-11).

Merkredon vespere 150 katolikaj junuloj kaj reprezentantinoj de la katolikaj junulinasocioj havis *komunan kunvenon* kun la kongresanoj. La devizo de la kunveno estis tiu de nia sankta Patro « Pax Christi en regno Christi ». Malgraŭ ke la kongresanoj preskaŭ ne sciis la italan lingvon, oni povis konstati, ke la rilatoj inter ili kaj la itala junularo jam de komenco estis tre koraj. Tion plej bone esprimis la *pastra gvidanto* de la junuloj, kiu post kantado de diversaj kantoj bonvenis la kongresanojn kiel gefratoj, gefiloj de la sama patrino, de la sankta eklezio. Post li parolis entuziasmige la sekretario de la katolikaj junulasocioj por la Torina distrikto, s-ro *Bartolo Paschetta*, pri la komunaj taskoj de la katolika junularo diverslanda laŭ la volo de nia sankta Patro, atentigante la ĉeestantojn je la papaj enciklikoj, precipe « Ubi arcano Dei ». *Reprezentantino de la katolika junulinasocio* fratine salutis la ĉeestantajn kongresaninojn kaj nomis ilin kunbatalantinoj por la surtera regno de Kristo. Nia samideano *P. Klein*, Essen (Germ.) akcentis en sia parolado la necesecon de internacia kunlaborado de la katolikaj junulasocioj, kiu pro diversaj cirkonstancoj ne funkcias en dezirinda amplekso. Li ankaŭ atentigis je nia helplingvo *Esperanto*, kiu plifaciligas tiajn rilatojn. — Intertempe la junuloj jam interŝanĝis adresojn kaj fotografaĵojn por estontaj rilatoj.



Mardon vespere, la 20-an de Augusto, la kongresanoj estis gastoj de la Torina Esperanto Asocio. Salutite de la prezidanto ili rigardis la hejmon de la asocio kaj poste kunsidis en la renkontejo babilante kaj rakontante vojaĝajn impresojn.

Peter KLEIN.

S-ro Klein, la gvidinto de la karavano, dankas en la nomo de ĉiuj partoprenintoj al nia fervora samideano Puiŝys pro liaj klopodoj, al la Torina Esperanto Asocio pro la bona akcepto, al la samideano Nicola La Colla pro la gvidadoj tra Torino kaj ĉirkaŭaĵo, al samideano Franco Ramolfo, per kies helpo inĝeniero Gambera de la fervoja direkcio disponigis al la karavano apartan vagonon por la veturado al Genova, kaj al samideano Michele Arabeno, kiu gvidis lin en Campo Santo en Genova.

# La VI-a Internacia Kongreso de MOKA en Barcelona

**Ĝia karaktero.**

Ne estas facile, raporti pri la MOKA-kongreso nunjara. Tro multflanka estis ĝia bildo, kaj laŭ tio, al kiu flanko oni prefere rigardas, oni elparolos sian juĝon.

Unue mia impreso : Mi estis ĝoja, ke mi povis partopreni ĝin. Mi konatiĝis kun bonaj kaj karaj homoj, revidis malnovajn amikojn, lernis multe kaj vidis la semon de nia movado ĵetata en novajn sulkojn. Kaj super ĉio kuŝis la eterne blua ĉielo de la sudo, la ĉarmo de la urbo Barcelona kaj la beno de Dio kaj de Nia Kara Sinjorino de Montserrat. Dankon al Dio !

Due mia kritiko : Malfavoraj cirkonstancoj estis malhelpintaj la venon de multaj geamikoj, kaj anstataŭ ili venis aliaj, kiuj parte ne havis tiun kapablecon kaj taŭgecon por efika kongreslaboro. Do la kongreso de Barcelona laŭ sia efiko ekstera estas malpli grava ol aliaj pli modeste anoncitaj aranĝoj de nia MOKA en ĉi tiu jaro.

Trie konstato : Ĉar do bedaŭrinde la anaro de la kongreso ne respegulis la anaron kaj idearon de nia movado entute, ĝi nur havas relativan valoron kiel mezurilo de la stato de nia agado, kaj ankaŭ por la katolika junularo tutmonda ĝia signifo ne estis tiel granda, kiel ni estis dezirintaj.

Pro tro malfrua dissendo de la invitiloj kaŭzita per malfacilaĵoj diversspecaj, ankaŭ la internacieco de la kongreso suferis. Kvankam entute ĉeestis amikoj el ok landoj (Hispanujo, Germanujo, Francujo, Ĉeĥoslovakujo, Luksemburgo, Nederlando, Jugoslavujo kaj Argentino), tamen la germana delegitaro konsistanta el 70 geamikoj, inter ili naŭ pastroj (60 anoj venis kun la kongresa karavano gvidita de Peter Klein), nepre formis la plimulton de la aktiva kongresanaro. La kaŭzo estis la speciale aktiva preparo de la Essen-a karavano, kiu dum tuta jaro laboris, dum ke en aliaj landoj nur en lasta horo oni komencis la propagandon. Pro tio ankaŭ la granda nombro de senkulpigoj.

Per la kongreso estis eble, veni en bonajn kontaktojn kun gravaj katolikaj rondoj de Hispanujo, kaj ni ŝuldas specialan dankon krom al **Pastro Salvador Ester,** la afabla loka preparinto, al la katolika gazetaro hispan- kaj katalunlingva, kiu ĉiutage detale raportis, speciale al « El Debate » (Madrid) kaj al « El Mati » (Barcelona).

## Raporto pri la kongresaj laboroj.

Je la komenco la membroj de la Internacia Komitato kaj de la Ekzekutiva Komitato estas akceptitaj de la **episkopo de Barcelona.** Lia episkopa moŝto aŭdis kun bonvola intereso la raportojn de **Pastro Salvador Ester, Pastro Francisko Gebhard** kaj **ĉefsekretario Wilhelm Solzbacher** pri la MOKA-movado, la celo de la kongreso kaj ankaŭ pri la neceseco de Esperanto. Li tre bedaŭris, ke li ne povis persone ĉeesti la kunvenojn pro multegaj laboroj, sed donis sian episkopan benon, eknomis Pastron Ester episkopa delegito en la komenca kunsido kaj donis al li plenan rajtigon, ordigi ĉion, speciale ankaŭ rilate al la eksterlandaj pastroj. — Estas dirote, ke ankaŭ la **Kardinalo de Tarragona** okupiĝis pri la kongreso kaj akcelis ĝin, petante la patrojn jesuitajn de Barcelona, disponigi al ĝi sian tutan helpon.

La solena malferma kunveno okazis en la granda salonego de la Casal Católico (Katolika Domego) de Barcelona-San Andrés, sidejo de la hispana nacia oficejo de MOKA. La teatrosalonego estis plenplena, enhavante **pli ol 600 personojn.** Ĉe la estrara tablo sidis la komitatanoj de MOKA, la oficialaj delegitoj de grandaj asocioj kaj aliaj eminentuloj. Tondra aplaŭdo eksonis, kiam la kurteno leviĝis kaj **Pastro Salvador Ester** komencis sian salutparoladon. Unue en kataluna, poste en hispana kaj fine en Esperanta lingvo li donis tutkoran saluton al ĉiuj, kiuj de malproksime venis al Hispanujo por la Kongreso, montris la altajn idealojn de nia movado kaj la nepran necesecon de komuna lingvo, nome Esperanto, por sukcesa internacia agado. — S-ro **José Ordinana** prezidanto de la grupo « Esperantista Amikeco » en la Casal Católico de San Andrés, salutis en Esperanto, dezirante plenan sukceson. **Regina Reiff,** anino de la Ekzekutiva Komitato de MOKA, deklamis **prologon** originale verkitan en Esperanto de **Ernst Görlich** (Wien). Poste en la nomo de la Internacia Komitato **Wilhelm Solzbacher** oficiale malfermis la kongreson. Unue en hispana lingvo kaj poste en Esperanto li dankis la hispanajn amikojn pro ilia afabla akcepto, skizis la celojn konkretajn de la kongreso kaj petis fervoran kunlaboron. Poste jena **kongresestraro** estas elektita :

**Prezidanto** : Pastro Salvador Ester Palau, direktoro de la Casal Católico de San Andrés, hispana nacia sekretario de MOKA.

**Vicprezidantoj** : Pastro Adolf Pelikan, S. J., Praha, pastra ĉefgvidanto de la Katolika Junularo de Ĉeĥoslovakujo. Pastro D-ro Kendler, München, eparkia prezidanto de la Katolika Junulara Asocio de Germanujo. Wilhelm Solzbacher, Köln, internacia sekretario de MOKA.

**Sekretarioj** : José Ordinana, Barcelona, prezidanto de « Esperantista Amikeco », kaj

Peter Klein, Essen, komitatano kaj karavanestro de MOKA.

Poste **pastro Francisko Gebhard** el la Luksemburga eparkio, kiu sian teologian klerigon kaj sian pastrigon ricevis en Hispanujo, per brila hispanlingva parolado entuziasmigis la popolon, parolante pri la internaciaj taskoj de la katolikoj kaj pri la neceseco de agado en la maniero de Mondjunularo Katoika. Pastro **Pelikan S. J.** salutis en ĉeĥa, franca kaj germana lingvoj, pastro **Kendler** alportis specialajn salutojn de la hispana princidino Paz vivanta en München. **Pastro Ester** transdonis la bensalutojn de la episkopo de Barcelona, kaj **Peter Klein** laŭtlegis belegan salutleteron de Lia Episkopa Moŝto Msgr. Dr. G. K. **grafo Majlàth,** episkopo de Transilvanio, kiu treege bedaŭris, ke li ne povis persone vojaĝi al la gastema Hispanujo, por ĉeesti la MOKA-kongreson. Ĉiuj paroladoj, se ili ne estis originalaj en tiuj lingvoj, estas tradukitaj en katalunan lingvon kaj Esperanton. La aktoroj de Casal Católico honore al la kongresanoj prezentis tri teatraĵojn, inter ili la ĉarman « La forto de la animo » (« La fuerza del alma ») de Jacinto Benavente. Oni faris rondiron tra la domego, ankaŭ admirante la Esperantan fakon kun granda Zamenhofa bildo. Al la kongresanoj poste la gastemaj « Casalencs » (« anoj de la Casal ») prezentigis per sia estraro trinkaĵojn. En la korto okazis komuna fotografado.



**La laborkunsidoj** okazis en la Centra Kolegio de la Jesuitoj, kiun oni pro ĝia centra situacio elektis anstataŭ la tro malproksima Casal de San Andrés. Okazis kvar tiaj kunsidoj, kies tri unuaj pritraktis la katolikan junularan agadon ĝenerale kaj kies lasta estis ĝenerala kunveno de MOKA. La kunsidojn prezidis alterne la prezidanto kaj la vicprezidantoj. La unuajn referatojn prezentis **Pastro Salvador Ester** kaj **Pastro Francisko Gebhard** pri « la taskoj de la katolika junularo en la Katolika Agado ». La katolika junularo ne estas nura objekto de pedagogia prizorgo, sed havas la taskon, aktive kunhelpi en la apostolado de la Eklezio, efikigante siajn vivajn fortojn ankaŭ tie, kie la maljunuloj pro antaŭjuĝoj aŭ rigidiĝo malfunkcias. Praktikaj helpinstitucioj estas gravaj tiucele. Pastro Gebhard ankaŭ raportis pri sia Mondpaca Institucio Marienau, kiu celas prepari junajn homojn al frata servado internacie bazita. Jen la kvin finaj tezoj, kiujn li prezentis al la kongreso :

« 1. Ne vortoj, sed vivanta kredo manifestiĝanta en helpanta agado, povas servi la vokon de la Sankta Patro al la Katolika Agado.

2. De MOKA kiel de ĉiuj junularaj asocioj la Katolika Agado postulas gvidantojn kiel perantoj por la realigo de la tasko de l'Eklezio al la vastaj amasoj de la katolika popolo. Al tio nin kapabligas nur la vivo el, en kaj por Kristo.

3. La ordono de Kristo estas, ke ni amu unu la alian, kaj « la evangelia ordono de la amo inter la unuopuloj estas neniel diferenca de tiu, kiu devas valori inter ŝtatoj kaj nacioj » (Benedikto XV-a kaj Pio XI-a).

4. Kontraŭe al la organizaĵoj de la malamo kaj de la popolsklavigo ni devas krei aliajn : sociekonomiajn pacajn instituciojn, novajn ordenojn de sociala-justiga karito.

5. La Paca Institucio Marienau plene staras sur la bazo de ĉi tiuj konkludoj, tial kunlaborado kun ĝi estas akcelinda. Formado de speciala agadkomitato estas rekomendata. » (Pri tiu institucio, kiu havas sian sekretariejon en la Saar-regiono kaj havas siajn rilatojn same al Germanujo kaj Francujo, ni publikigos specialan raporton.)

**Aloys Seyock** (Düsseldorf), estrarano de la Katolika Junulara Asocio de Germanujo kaj redaktoro de ĝia organo « Die Wacht », paroladis pri « la paca ideo kaj la katolikaj junularaj asocioj », montrante, kiel en asocioj kaj unuiĝoj oni devas labori kaj jam laboras, por eduki homtipon, kiu, ĉerpante el profundaj religiaj fontoj, ankaŭ en la publika vivo plenumas sian taskon. **Wilhelm Solzbacher** (Köln) pritraktis la « internacian kunagadon de la katolika junularo », skizante estiĝon, historion kaj staton de la diversaj organizaĵoj, la malfacilaĵojn, kiuj en la nuna momento malhelpas kaj parte eĉ paralizas ilian agadon kaj la praktikajn taskojn de la nuna tempo. La klerigo kaj eduko de kapablaj kaj sindonaj gvidantoj estas la plej urĝa bezono. Tio valoras por ĉiuj organizaĵoj, en speciala senco ankaŭ por MOKA.

La dua kaj tria kunsidoj donis **raportojn el la landoj.** Pri Hispanujo ni aŭdis tri tre interesajn paroladojn. Pastro **Salvador Ester** donis superrigardon pri la katolika agado de sia lando. Grave estas, ke tre multaj organizaĵoj havas nur lokan signifon kaj ne estas aliĝintaj al iu centrejo. En Katalunujo ludas gravan rolon la « Katolikaj Domegoj » zorgantaj samtempe pri instrua, kleriga, arta kaj bonfara agadoj. Ankaŭ pri parohaj organizaĵoj por spiritaj ekzercoj, pri sindikatoj kaj kooperativoj ni aŭskultis interesajn sciigojn. — **Pastro Manuel Maria Vergŝs S. J.,** ĉefdirektoro de la Marianaj Kongregacioj, donis raporton pri tiu tre aktiva movado, kaj **Universitata Profesoro D-ro Manuel de Montoliu,** prezidanto de la « Lligas de Perseveranca » (Ligoj de Persisto), rakontis pri tiu religia movado komencita per la institucio de spiritaj ekzercoj de Pastro Vallet

kaj atinginta eliton de la katolika junularo de Katalunujo. — El **Germanujo** raportis Pastro **D-ro Kendler** (pri Junvira Asocio), **Heinz Kolvenbach** (pri la germana sekcio de MOKA), **Carl Degen** (pri Quickbornligo) kaj **Aloys Seyock** (pri Katolika Gimnastika kaj Sporta Asocio Deutsche Jugendkraft), en la diskutado donis gravajn aldonojn Pastro **Kind** (eparkia prezidanto de Junvira Asocio por Fulda), **D-ro Curt Becker** kaj **Kurt Döbler**. — **Abbé de Morlaincourt** paroladis pri la katolika junulara agado en Francujo, speciale pri la katolika skoltismo. Ankaŭ tie sekvis interesa diskutado. — **Patro Pelikan S. J.** donis la raporton pri Ĉeĥoslovakujo, kaj fine **Wilhelm Solzbacher,** jus veninte de vojaĝo tra dek landoj, en kiuj li vizitis multajn centrejojn kaj gvidantojn de katolika junularo, donis ĝeneralan superrigardon pri pedagogiaj metodoj, agadmanieroj kaj institucioj en la diversaj landoj de Eŭropo kaj ankaŭ de la aliaj kontinentoj, komparante la diversajn tipojn. Li speciale atentigis pri la grandiĝanta signifo de la katolika junulara movado en ekstereŭropaj landoj kaj alvokis al forta kaj frata kunlaboro. — En la **ĝenerala kunsido de MOKA** raportoj pri MOKA, ĝiaj praktikaj instittucioj, ĝia organo LA JUNA BATALANTO kaj ĝiaj intencoj por la estonteco estas donitaj. La vigla diskutado alportis multajn bonajn proponojn. Oni unuanime akceptis **novan regularon de MOKA** kaj tri **rezoluciojn**, kiuj estas aparte presitaj en ĉi tiu numero. Oni decidis organizi la sekvontan MOKA-kongreson post du jaroj en Sudorienta aŭ Orienta Eŭropo (Rumanujo, Hungarujo aŭ Polujo) kaj aranĝi en la jaro 1930 internan internacian laborsemajnon en Vieno.

Ĉiumatene la kongresanoj kunvenis al komuna sankta meso en la jesuita kapelo, kelkfoje aŭskuitante specialajn predikojn de niaj pastraj amikoj. Okazis gvidadoj tra la Internacia Ekspozicio kaj ĝia belega Misia Palaco, kaj en la mezo de la kongreso ni pilgrimis al la mondfama sankta monto Montserrat, dediĉante n'an movadon al la potenca protekto de la Reĝino de la Paco...

Post la kongreso okazis komunaj veturadoj al Lourdes, al Suda Hispanujo, kaj al la Junulara Paca Demonstracio en la Trocadéro en Paris.

### La uzo de Esperanto en la MOKA-kongreso.

Ni esttis anoncintaj, ke Esperanto estos sola traduka lingvo, escepte en publikaj demonstracioj, kie oni devus ankaŭ uzi hispanan kaj katalunan lingvon. Bedaŭrinde nun tre multaj geamikoj diverlandaj pro manko de tempo kaj mono kaj pro la malfrua definitiva invito ne povis veni, kaj do eĉ ne la duono de la kongresanoj estis membroj de MOKA. Ja la membroj de la karavano de Peter Klein devis, se ili ne estis Esperantistoj, aĉeti Esperanto-lernolibron, kaj vere multaj preparis sin al la kongreso, lernante Esperanton, sed kompreneble ili ne fariĝis tuj perfektaj Esperantistoj. Sed ili komprenis Esperanton, kaj tio ja estus sufiĉinta.

En la granda publika **malferma kunveno** en San Andrés kun 600 ĉeestantoj kaj la unua komitata kunsido ni uzis a sistemon anoncitan : Esperanton kiel traduka lingvo. Sed en la **laborkunsidoj** montriĝis, ke niaj Esperantistaj amikoj el Barcelona ne havis libertempon kaj ne povis ĉeesti dum la tago, escepte de ĝia prezidanto Don Salvador Ester. Sed ĉeestis aliaj hispanaj amikoj ne komprenantaj Esperanton. Ĝenerale ĉiuj ĉeestantoj komprenis hispanan aŭ germanan lingvon, do ni uzis tiujn lingvojn, laŭ bezono aldonante en specialaj kazoj Esperanton kaj francan lingvon. Ĉu en tiuj cirkonstancoj la uzo de Esperanto ne estus estinta absurda?

Tamen ĉiam denove en n'a kongreso estas atentigita pri Esperanto. La kongresa karavano el Centra Eŭropo dum s'a antaŭkongreso en Torino sukcese uzis Esperanton. Kaj estus sufiĉinta, rigardi dum la kongresaj tagoj en la katolikajn jurnalojn hispan- kaj katalunlingvajn, por konvinkiĝi pri la granda propagando farita por Esperanto per nia kongreso. Ili ĉiam denove parolis pri Esperanto, pri n'a organo « La Juna Batalanto » ktp. Kaj ankaŭ en postkongresaj raportoj en la gazetaro diverslanda estas propagandita. **En centoj da artikoloj** pri la kongreso estas propagandite por Esperanto. Kaj en la oktobra numero de « Kataluna Esperantisto » (ĝi estas eldonata en Barcelona mem, do devas esti kompetenta, ĉu ne?) estas skribite, ke « per la MOKA-kongreso estas farita bona propagando por Esperanto en katolikaj rondoj neesperantistaj ». Tio sufiĉu, por respondi al atakoj pri la uzo de Esperanto en Barcelona !



### Salutoj al la kongreso en Barcelona.

El la granda nombro da salutleteroj kaj salutoj buŝe transdonitaj sufiĉu la citado de jenaj : Lia Ekspiskopa Moŝto D-ro G. K. grafo Majlath, Alba Julia, Rumanujo; Katolika Junulara Unuiĝo de Polujo ; Katolika Junulara Asocio de Svisujo ; Katolika Junvira Asocio de Germanujo ; Catholic Truth Society, Anglujo ; Katolika Junulara Asocio de Ĉeĥoslovakujo ; IKA-Prezidantaro ; IKA-Kongreso de Budapest ; P. Martindale S. J., Anglujo ; Msgr. Dr N. Pfeiffer, Košice, Ĉeĥoslovakujo ; P. Method Klement O. S. B., Ĉeĥoslovakujo ; P. Modesto Carolfi O. F. M., Italujo ; Pastro Marti Albanell, Hispanujo ; Msgr. Dr. Ildefonso Montero Diaz, Hispanujo ; Junulina Sekcio de la Internacia Katolika Virina Ligo, Bruxelles, Belgujo ; Paca Ligo de Germanaj Katolikoj, Germanujo ; Katolika Junularo de Germanujo ; nacia sekretariejo de MOKA por Hinujo ; nacia sekretariejo de MOKA por Hungarujo ; nacia sekretariejo de MOKA por Francujo ; nacia sekretariejo de MOKA por Aŭstrujo, k. a. Jen estu citataj du duonstrofoj el la prologo verkita por la kongreso de Ernst Görlich kaj deklamitaj en la malferma kunveno de Regina Reiff :

« El nia, jen, internacio
De katolika junular'
Fariĝu per la forta Dio
Iam grandega mondfratar'.
Laboru nun kun kor' kaj manoj !
Antaŭen ! Ne hezitu vi !
Pri taskoj pensu, MOKA-anoj,
Sed ĉiam, ne nur tie ĉi ! »

---

## DECIDOJ KAJ REZOLUCIOJ DE LA KONGRESO DE BARCELONA

### 1. Katolika Junularo en Ekstereŭropaj Landoj.

La kongreso de Mondjunularo Katolika en Barcelona aplaŭdas la grandan aktivecon de MOKA en ekstereŭropaj landoj kaj petas la internacian oficejon, krei en kiel eble plej granda mezuro instituciojn por praktika kunlaborado de eŭropa kaj amerika junularo kun katolika junularo en misiaj landoj.

### 2. Esperanto.

La Kongreso de Mondjunularo Katolika denove atentigas la katolikan junularon tutmondan pri la graveco kaj neceseco de komuna helplingvo en la internacia kunlaborado. Ĝi alvokas la gejunulojn, lerni Esperanton kaj legi la internacian gazeton de MOKA « La Juna Batalanto », invitas la katolikajn organizaĵojn, serioze studi la eblecojn de praktika utiligo de la internacia lingvo en siaj rilatoj al eksterlando kaj akceli ĝian propagandon inter siaj membroj.

### 3. MOKA kaj IKUE.

La kongreso de Mondjunularo Katolika aprobas la decidon de la Ekzekutiva Komitato, komenci intertraktadojn kun la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, esprimas sian principan pretecon, kunlabori kaj aliĝi al IKUE kiel internacia membro kaj petas la internacian oficejon, daŭrigi la intertraktadon.

# SABRO KAJ PAFILO

De M. Bajez.

Esperantigis **Leopold Lackner** (Wien) el « Das Meer », monata gazeto por infanoj. Represo permesata, dezirata.

Por kiarigo : Kristnaskulo estas abstrakta figuro, sub kiu kelkaj popoloj imagas al si tre aĝan viron, kiu, kvazaŭ kiel sendito de la ĉiela Jesueto, alportas al la infanoj la donacojn donacatajn de iliaj gepatroj. Noto de la tradukinto.

Vespero kristnaska.

Estis jam tute malhele en la ĉambro. Sed de el angulo tamen ankoraŭ lumis orbrileto. Jen staris la kristarbeto rigide kaj solene sur la neĝblanka tabloteko, kvazaŭ malgranda knabineto, kiu ne volas difekti al si la vestornamajon.

Ja, sed tio ankaŭ estis ornamajo! Ĉiutage antaŭ la kristnaska vespero la diligenta patrino estis maldorminta ĝis profundnokte kaj preparinta la festornamajon de la arbeto, tranĉe formis el blanka silkopapero ĉarmajn rozetojn kaj tiris tra ili orajn fadenojn, gluis mirinde belegajn korbetojn kaj plektis orĉenojn briliantajn. Kaj ĉiam denove ŝi nombris la malgrandan enhavon de sia monujeto kaj faris finfine tion, kion fari ŝi ne estus rajtinta — ŝi aĉetis belan bildlibron multekostan kaj penroskatolon kun multegaj kolorajoj.

Ĉion nur por Franĉjo. Franĉjo ĝoju je la sankta vespero !

Kaj tamen preskaŭ kun korfrapo ŝi ekbruligis la kandeletojn. Ĉu Franĉjo fakte ĝojus? Certe ŝi preparis por li la kristnasko — tableton kun la tuta, karesema amo de sia patrina koro, sed lian plej ardantan deziron ŝi tamen ne povis plenumi, ne rajtis plenumi.

Kiel estis skribite en ĉiuj leteroj, kiujn la etulo sendis al la Kristnaskulo ? « Ho, kara Kristnaskulo, mi petegas vin, alportu al mi sabron kaj pafilon. Nenion alian vi bezonas al mi donaci, kara Kristnaskulo, nenion, eĉ ne kristarbon, nur sabron kaj pafilon. »

La patrino provis timeme forigi el lia kapo ĉi tiun penson, sed li tute ne aŭskultis. Kion scias virinoj pri aferoj tiaj ! Li firme fidis je la komprenemo de la Kristnaskulo.

Kaj kiam li poste staris antaŭ sia donactablo kaj nek ekvidis sabron nek pafilon — jen leviĝis en liaj vangojn varmego kaj kolerego. Kion li faru kun la stulta bildolibro! Li ja ne estas malgranda knabo !

Sed poste li tamen faris tion, kion faras ĉiuj knaboj, kiam la unua seniluziigo ektuŝas ilian koron. Li ĉagrene ekploregis.

Kaj nun li kuŝis en sia lito, plorsingultis en la kusenojn kaj obstine fortiris sian kapon el la mildaj, konsoligaj patrinaj manoj.

« Mia knabeto, la Kristnaskulo ja alportis al vi tiel belajn objektojn, — rigardu nur foje tiun belegan bildolibron — »

« Mi ĝin ne volas! Nenion mi volas! Ĉar la Kristnaskulo al mi ne portis sabron kaj pafilon, tiam li ankaŭ ree forprenu la alian! — Nun mi ree devas sopire rigardi, kiam la aliaj ludas militon, aŭ ree esti savbrigadulo... »

Senkonsile karesis la patrino la ploranton.

« Li nur ree ĉion forportu! Nenio min ĝojigas, nenio, mi nur volas sabron kaj pafilon... »

«Kiel lia patro » malĝoje meditis la patrino. En malproksiman pasintecon ŝi turnis sian rigardon. Ŝi lin denove vidis, la brunbuklan najbarfilon kun sia ligna sabro kaj kun la boltpafilo. Kiu tiam estus al ŝi dirinta ke li fariĝos ŝia edzo! Kaj ŝi lin vidas pense kiel viglan junulon. He, kiel la sabro fulmetis en lia mano, kiel certe li trafis la birdon en la aero! Kaj



tiam antaŭ ŝiajn lacajn okulojn sin trudis lasta memorbildo. Jen li staris antaŭ ŝi, tiel, kiel ŝi lin vidis la lastan fojon — ridanta kaj venke gaja — kun sabro kaj pafilo —.

Sabro kaj pafilo — tiuj estis kaŭzintaj ĉiun ŝian mizeron.

Sabron kaj pafilon ne, Franĉjo ilin neniam ricevos, ankaŭ ne kiel ludiloj.

Ĝemante ŝi leviĝis. Ĉu Franĉjo vere, hodiaŭ la unuan fojon, ne postulus la adiaŭan kison de la patrino? Ankoraŭfoje ŝi ekstaris, atendante, sopireme, — tiam post ŝi fermiĝis la pordo.

Franĉjo sin klinis alten. Ĉu la patrino vere foriris — sen bonnoktakiso? Lia koro tiel ege afliktiĝis. —

Jen li aŭdis paŝojn.

Kontentigite li kuŝiĝis. Ho, ja patrino revenis.

Sed tiam ege ekbatis lia koro.

Tio tamen ne estis la patrino !

Vi kara Dio !

Pezaj, palpe irantaj paŝoj proksimiĝis al la pordo, maldelikata mano fingrumis je la seruro. Jen la pordo malfermiĝas.

La Kristnaskulo !

Franĉjo lin tuj ekkonis. La koro al li tute haltiĝis.

Hu, rigardis tiu malfavore! Kaj kiel li spiregis !

Franĉjo preskaŭ ne kuraĝis spiri, kiam nun la Kristnaskulo bruige paŝis al la angulo, en kiu staris la arbeto kaj kun kolerega trajto malapeniĝis en sian grandan sakon la bildolibron kaj farboskatolon. Sed kiam li decide ekprenis la kristarbeton ĉe la pinto, la malgrandulo laŭte ekkriis.

« Ne, ne, — mi petas, ne ĉion forprenu ! »

« Vi ja diris, mi ree ĉion forprenu ! »

Ve, kian krudan, koleran voĉon la Kristnaskulo havis ! Pro timo Franĉjo denove faris tion, kion estus farintaj ĉiuj malgrandaj knaboj en lia situacio — li ekploregis.

« Nu, ĉesu nur en via plorado », grumblis la Kristnaskulo kaj paŝegis al la lito, « kia malsaĝa bubo vi do estis, insultante la belajn ludilojn, de mi alportitajn al vi? Ha? — Vi nenion bezonas diri, mi ĝin ja scias. Sabron vi volis kaj pafilon, — kredeble, por ke oni povu bele ludi militon.

Sed sciu, tion mi neniam plu alportas al knabo !

Aŭskultu, estis antaŭ proksimume 40, 50 jaroj, kiam min frapis la Kristinfano sur la ŝultron : « Nu, maljunulo, estu vi pli afabla kaj ne alportu al la infanoj tiel stultajn ajojn, — al la knaboj indianlibretojn kaj al la suĉinfanoj suĉilon. — Fi ! »

Nu, bone, mi pensis kaj kolektis ĉiujn leterojn. Kaj la malgrandaj knaboj ne peniĝis min. Ĉiuj deziris la saman : sabron kaj pafilon. Bone, mi pensis kaj plenumis ilian volon. Ĉion, kion ili deziris, tion mi alportis, soldatojn, ĉakojn, kaskojn, — kaj kompreneble sabron kaj pafilon. Tio estis la ĉefaĵo : Tre multajn sabrojn kaj pafilojn.

Ho, tio estis ĝojego inter la buboj! Nenion ili volis plu ludadi ol nur ĉiam militon ! Militon ! Ofte doloris miaj oreloj, kiam ili tiel kriegis : « Hura, hura, teren la malamiko ! » Kelkfoje ili tro multe petolegis — mi kredis tre volonte, ke neniu volis prezenti la malamikon. Ĉar al tiu oni ĉiam kondutis, tre malĝentile. Unue li ricevis amason da batoj kaj poste li estas mortpafita. Sed tamen ĉio estis nur ŝerco. Kiam finiĝis la ludado, tiam la mortpafitaj malamikoj ree ridante eksaltis. Kaj nun devis esti la aliaj la kontraŭuloj kaj ankaŭ estis bate atakitaj. Estis granda plezurego. Nu, kaj tiam la knaboj pligrandiĝis. « Nun vi jam povus ĉesi kun via petola ludado », mi pensis. » Vi ankoraŭ scias tre malmulte pri la bela Dia mondo, vi nenion scias pri la vivmaniero de la aliaj popoloj kaj kiel la kara Dio al ĉiu popolo destinis ĝian propran grandan taskon. » Herbujojn mi alportis

al ili kaj belajn klerigajn librojn — ja dankon! Ili ja estis frenezaj — ili nur volis ludi per pafiloj kaj lancoj, — kaj mi, mi ilin alportis.

Kaj ili ne plisaĝiĝis, ankaŭ ne, kiam ili preskaŭ jam mem povus posedi gefilojn. Ĉiam ili devis praktiki militon. Ofte mi preskaŭ devis ekridi, kiam ili estis precipe fervoraj kaj tiom senbride ĝojegis. Ja, pri kio ? Nu, ĉar ili povis interbatali. « Ili estas ankoraŭ ĉiam la samaj malsaĝuloj » mi pensis. Sed tiam min do ekkaptis timo. Kaj mi plej volonte estus dirinta al ili : « Ĉesu tiun aĉan kriegadon! Kio fariĝu el tio! Certe nenio bona! Kial vi ĉiam volas mortigi unu la alian? Vi ja tute ne konas vin reciproke. Kunvenu foje kaj interparolu — sed sen sabro kaj pafilo! »

Zorgoplene la Kristnaskulo rigardis antaŭ si. « Sed ili ja ne volis obei. Kaj subite la afero ege serioziĝis, — ho, kion mi tiam devis elteni, kiam mi pensis la multajn malgrandajn sabrojn, de mi donacitajn al ili, por ke ili havu okazon, bone ekzerci kaj praktiki la teruran mortigadon. Vera timo min kaptis, pripensante la eblecon, ke ili nun povus postuli de mi realajn armilojn, — ho ne, ili min ne plu bezonis, ili jam ricevis tion de aliaj.

Via patro ankaŭ ĉeestis. Li estis inter tiuj, kiuj kriis plej laŭte : « Morton al la malamikoj! » Li tion jam tiel estis ekzercinta. Kvin, ses kontraŭulojn li mortpafis, — tute tiel, kiel li ĝin faris knabaĝe. Sed, ĉu vi scias, tiuj, kiujn li nun mortpafis, — tiuj ne plu stariĝis ridante, — ili nun jam estis fakte malvivaj. Kaj nun ankoraŭ ion, aŭskultu : En la reala milito sin defendas la malamikoj, ili repafas. Subite via patro renversiĝis, sangosuperŝutite falis teren. Kaj la aliaj kuris super lin. Ho, mia infano, mi ne volas diri al vi, kion tiam suferis via patro. Se vi tion ekscius, vi certe vivdaŭre neniam plu ĝojus.

Kaj vespere, jen lia vivo finiĝis. Jen li kuŝadis dolorplene, — ho, mia infano, nun li eksciis : reala milito tute alie aspektas ol la stulta knaba ludo. Kaj ĉiam li pensis pri vi kaj via patrino. Precipe pri vi. Ho, se nur unufoje li estus povinta paroli al via patrino. Ĉu vi scias, kion li estus dirinta al ŝi? « Neniam donu al mia knabo sabron kaj pafilon en la manon! Ne permesu, ke lia malgranda koro veneniĝu per malamo — tiam li estonte ne tiel mizere pereos, li ne bezonos morti kiel mortiginto — kiel lia patro! »

Li silentis momenton. « Vidu infano », li daŭrigis, « nun vi scias, pro kio mi al neniu knabo plu alportas batilon aŭ pafilon. »

« Jes », respondis Franĉjo timeme, « sed vi ja ree al tiel multaj kamaradoj alportis sabron kaj pafilon. »

Jen la aĝulo kolerigite vigliĝis. « Ne mi! Tion donis al ili tute senpripensaj homoj, al kiuj la lasta milita sangoverŝado ankoraŭ ne sufiĉis. Kaj tiam ili diraĉas :

« Tio estas de la Kristnaskulo. »

« Jes, jes, tia estas la afero. »

Tute silente sidis la honesta maljunulo kaj enpense strange balancetis sian kapon. Franĉjo lin nur kvazaŭ vidis tra vualo. La palpebroj al li iĝis tiel pezaj, tiel pezaj...

Kiam Franĉjo je la sekvinta mateno vekiĝis, lia unua rigardo nur estis direktita al la bildlibro kaj al la pentroskatolo. Ĉu la Kristnaskulo vere estis forportinta ilin? Ho ne, jen ĉio kuŝis, ĉarme ordigita. Ĝoje kriante Franĉjo al ĝi palpis.

Kaj jen mallaŭte la pordo malfermiĝis kaj la patrino en la ĉambron ŝovis sian karan, zorgoplenan vizaĝon.

Kaj jam Franĉjo pendis je ŝia kolo. « Sed nun, panjo, nun vi ree amas min, ĉu ne? Kaj hodiaŭ ni denove foje bruligas la kandeletojn, — kaj, ĉu ne, panjo, kiam ni hodiaŭ preĝos por la patro, tiam diru al li, ke mi » — lasta, mallonga animbatalo — « ke mi neniam plu deziros sabron kaj pafilon. »



# JUBILEA KOLEKTO POR LA JUNA BATALANTO

## ALVOKO AL ĈIUJ.

Karaj amikoj ! En ĉi tiu jaro ni decidis la sendependan eldonon de La Juna Batalanto. Kelkaj geamikoj el la gvidantaro surprenis grandajn laborojn kaj oferojn, kaj ni kopodis fari el La Juna Batalanto imponan heroldon de la internacia katolika junulara kaj paca movado, kiu devus enpenetri en gvidantajn rondojn en ĉiuj landoj, devus tie disvastigi valorajn informojn kaj niajn ideojn, devus fariĝi la internacia diskutejo kaj parolejo de la junaj katolikoj pri ĉiujproblemoj kaj taskoj de nia epoko, devus tiel jam per sia nura ekzisto kaj praktika konvinko, ankaŭ disvastigi Esperanton kaj ĝian praktikan utiligon en la katolika junularo tutmonda.

Ni komencis tion, sendis nian gazeton en multajn rondojn, kie oni antaŭe ne konis nin. Kaj — ni estis atentitaj, venis multaj entuzismaj leteroj, centoj da ĵurnaloj kaj revuoj laŭdante skribis pri nia entrepreno, dekoj represis el ĝi gravajn informojn. Jes, nia vojo ne estas utopia, sed tute reala.

Sed — ho ve ! — en alia afero nia espero estas trompita. La presado kaj dissendado de gazeto ja ne povas esti pagata per laŭdleteroj, entuziasmaj vortoj kaj favoraj recenzoj, sed nur per reala — mono. Ni estis pensintaj, ke la subteno de multegaj gesamideanoj en tiu afero estos certa al ni, do ke ĉiuj mem tuj abonos kaj instigos multajn aliajn al abono. Ni estis pensintaj, ke tiu unua bazo estus nepre solida kaj ke ni povos uzi ĉiujn niajn fortojn por serioza ekstera varbado kaj dissvastigo de niaj ideoj. Sed, kiel ni jam diris, ni eraris. La stato de niaj abonantoj pagintaj — entuziasmaj vortoj estas pli malmultekostaj — estas ankoraŭ ridinde malgranda. Nun ni troviĝas en la bedaŭrinda situacio, devi uzi nian zorgon kaj niajn fortojn por nura ekzisto ! Sed tio ja ne estas nia tasko. Ni ne volas esti klubgazeto, kiu ĉiam konvinkas la saman malgrandan aron pri la praveco de niaj ideoj, la neceseco de junulara agado kaj la praktika utileco de Esperanto, sed ni volas ankaŭ paroli al ekstere, ni volas konvinki ALIAJN, ni eĉ volas — aŭ, ĉu vi pensas, ke tiaj vortoj nur signifas dolĉaĉan revon de bigotuloj ? — GAJNI LA MONDON POR KRISTO KAJ LIA REGNO DE LA PACO !

Ni devas veni al tia situacio, ke la abonantoj mem pagas tion, kion ili kostas al ni kaj ke specialaj financaj subtenoj povas esti utiligataj por grandioza enpenetrado konstanta kaj obstina en tiujn rondojn, kiujn ni volas almiliti.

Geamikoj, kunbatalantoj, helpu nin, ke ni en tiu senco povu plu labori ! Varbu pagantajn abonantoj, por ke ni almenaŭ ne plu devu timi pri la plej simpla kaj banala bazo de nia gazeto. Ne atendu, sed agu tuj ! Varbu, varbadu !

En ĉi tiu monato nia MOKA-movado festas sian DEKJARAN JUBILEON. Vi jam scias, ke en la lasta tempo nia movado multe kreskis en ekstera influo kaj en laboreblecoj. Zorgu, ke ĝi ricevu tian gradon de la interna forteco, ke ĝi povu riski entrepreni tiajn grandajn laborojn, kiuj nun kuŝsas antaŭ ĝi. SED LA MEZURILO DE TIU INTERNA FORTECO DE NIA MOVADO ESTAS LA STATO DE NIA GAZETO « LA JUNA BATALANTO.

Ni do malfermas JUBILEAN KOLEKTON, alvokante la junan batalantaron tutmondan al kunhelpo. Donacu monon por la batalkolekto de nia internacia organo !

NE PROKRASTU ĜIS MORGAŬ, KION VI POVAS FARI HODIAŬ ! LA JUNA BATALANTO NE mortos sen vi — por tio tro serioza estas la volo de ĝiaj eldonantoj kaj tro fortika la entuziasmo de la junaj homoj en la MOKA-movado, — sed kun via helpo ĝi gajnos forton por tiuj grandaj taskoj nun ne realigeblaj, ĉar ĉiuj eblecoj estas ensorbataj per la nura ekzistobatalo. Antaŭen !

ĈIUJ, EĈ PLEJ MALGRANDAJ SUMOJ, POVAS ESTI SENDATAJ AL LA REDAKCIO AŬ AL LA ELDONEJO, ĈU EN MONBILETOJ, ĈEKOJ, POŜTMANDATOJ, RESPONDKUPONOJ, UEA-KUPONOJ, GERMANAJ POŜTMARKOJ !

LA NOMOJ DE LA DONACINTOJ (LAŬDEZIRE PSEUDONIMOJ AŬ NUR KOMENCOLITEROJ DE LA NOMO) ESTOS PUBLIKIGATAJ EN ĈI TIU LOKO.

# NIA MOVADO

### Internacia Oficejo.

**Jubileo de la Sankta Patro.** La 20 decembro la patro kaj instruisto de la kristanaro solenas la 50-jaran jubileon de sia pastreco. La tuta granda internacia familio katolika ĝojas kaj jubilas kaj promesas fidelecon, obeon kaj sindonon al la Roko de Petro. En la nomo de la MOKA-anaro tutmonda en ĉi tiuj tagoj nia alta protektoro Lia Episkopa Moŝto Msgr. D-ro G. K. grafo Majlath de Alba Julia en Rumanujo sendas leteron al Romo, esprimante nian ĝojon kaj niajn gratulojn kaj promesante, ke nia idealo de Pio XI-a proklamita : « La Paco de Kristo en la Regno de Kristo! » movado daŭrigos la agadon por la alta MOKA.

**La Ekzekutiva Komitato** havis la lastajn kunsidojn en Köln, Barcelona kaj Süchteln. Nove elektitaj membroj estas Carl Degen (M.-Gladbach) kaj Heinrich Grues (Köln), la unua ankaŭ kiel membro de la financa komitato.

**Jubilea Kolekto por J. B.** Ni ankaŭ ĉi tie atentigas pri la monkolekto por J. B. anoncita en ĉi tiu numero. Nia MOKA-movado, kiu en ĉi tiu monato povas festi sian dekjaran jubileon, kreskis en la lasta tempo konsiderinde en ekstera influo kaj eblecoj de agado. Sed por povi sukcese kaj unuece labori, ĝi bezonas multe pli da interna forteco. Kaj por ĝi nia internacia organo «La Juna Batalanto» estas mezurilo. Helpu, donacu, subtenu ĝin ! Per tio vi plej bone esprimas vian jubilean ĝojon. Ĝojan Kristnaskon ankaŭ al la kaso de J. B. !

**Internaciaj konferencoj 1929.** En multaj internaciaj kunvenoj MOKA estis reprezentata aŭ por kunlaboro aŭ por observo. Ĉar mankas la loko, por publikigi detalajn raportojn, ni publikigas la nomojn de niaj gvidantaj geamikoj partoprenintaj,por ke interesuloj korespondu kun ili. Kompreneble niaj proproj internaciaj konferencoj en Venlo, Louvain, Torino kaj Barcelona ne estas citataj :

I-a Internacia Antiimperialista Junulara Konferenco, **Frankfurt** : D-ro Leo Fleischer, Maria Josefa Sommer ;

II-a Kongreso de la Ligo kontraŭ Imperialismo, **Frankfurt** : la samaj ;

Mondjunulara Kunveno, **Freusburg** : Maximinus Schmoller, Wilhelm Solzbacher ;

Internacia Konferenco de la Mondjunulara Migrada Servo, **Freusburg** : Wilhelm Solzbacher ;

Universala Kongreso de Esperanto, **Budapest** : Walter Mudrak ;

Internacia Esperanto-Libertempo, **Oostduinkerke-sur-Mer** : Martin Fehr ;

Internacia Katolika Esperanto-Kongreso, **Praha** : Jan Filip, W. Solzbacher ;

Internacia Eduka Konferenco, **Genève** : Heinz Kolvenbach ;

Konferenco de la Int. Frataro por Repaciĝo, **Lyon** : Kurt Döbler, D-ro Nikolaus Ehlen, Josefa Hüttenmeister, Heinz Kolvenbach, Kaspar Mayr ;

IKA-Kongreso, **Budapest** : Aloys Kabelka, Németh Laszlo, Kaspar Mayr, W. Solzbacher ;

Internacia Demokrata Paca Kongreso, **Bierville** : Kurt Döbler, D-ro Leo Fleischer, Heinz Kolvenbach ;

Kongreso de Paca Ligo de Germanaj Katolikoj, **Frankfurt** : August Günther ;

Internacia Kongreso de Tabakkontraŭuloj, **Paris** ; Walter Mudrak.

I-a Internacia Katolika Kongreso por Senalkohola Junulara Eduko, **Münster** : W. Solzbacher.

### Argentino.

**Buenos Aires.** Nova kunlaboranto Pastro Alarcon S. J.

### Aŭstralio.

**Hawksburn.** Nova del. A. Renwick.

### Aŭstrujo.

**Aŭstra MOKA-konferenco** okazis en Wien la 14 aŭgusto dum vizito de la internacia sekretario. Pliaktiviĝo de la laboro okazos.

**Wien.** Nia amiko Kaspar Mayr fondis katolikan **pacan grupon** laborantan en nia senco. Adr : Kaspar Mayr, Wien XVII., Nachreihengasse. — De aliaj amikoj ni ricevas raporton pri fondo de **Rondo de Katolikaj Sociologiistoj,** pri kiu speciale nia amiko D-ro Hloucha meritiĝis. Prezidanto de la unua kunsido estis fabrikanto Joh. Zacherl (Wien XIX., Nusswaldg. 9), sekretario estis Abato D-ro Alois Wiesinger O. S. B. — **Artikolojn pri La Juna Batalanto** enhavis gazetoj « Junges Leben » kaj « Pravda » (ĉehlingva), « Heiligfeuer » represis el J. B. noton « Demono alkoholo kaj misioj » en traduko de Leopold Lackner, pri MOKA-kongreso en Barcelona raportis « Reichspost ». « Schönere Zukunft », plej grava katolika semajna gazeto do Centra Eŭropo, en du artikoletoj raportis pri MOKA, La Juna Batalanto kaj la kongreso en Barcelona.

**Salzburg.** Laboras nia delegito Peter Schwab.

Pastro Prof. D-ro Christanell gvidas Esp. kurson en la Katolika Universitato. La grupo « Estonteco » vigle agadas.

### Belgujo.

Bona kunlaboro de gvidantoj de belga junularo kun germanaj gvidantoj pere de MOKA. Vojaĝo de belga katolika junularo al Praha estas helpita per ni. En 1930 okaze de la jubileo de 100-jara libereco okazos rondvojaĝo tra Belgujo, kiun ni subtenos eksterlande.



### Ĉeĥoslovakujo.

**Nia ĉefsekretario** vizitis en Praha la ĉefojn de la katolika junularo. La pastra prezidanto de Strudzeni Katolicki Mladez ĉeestis nian kongreson en Barcelona kaj ankaŭ estonte kunlaboros.

### Francujo.

**Nacia sekretario** Prof. Muffang dissendis presitan cirkuleron invitantan al kunlaboro.

**Nia franclingva bulteno** « La Jeunesse Mondiale Catholique » bedaŭrinde ankoraŭ trovis nur malmultajn mendantojn. Ĝi estas nepre necesa por sukcesa propagando ! Mendu ! 10 ekz. kostas nur 1 frankon !

### Germanujo.

**Paca Ligo Katolika** havis sian kongreson en Frankfurt, kaj oni ankaŭ raportis pri MOKA. Nia reprezentanto estis August Günther. Ĉe la novelekto de la estraro multaj el niaj geamikoj estas elektitaj, ekz. D-ro Nikolaus Ehlen, Heinz Kohlenbach Pastro D-ro M. J. Metzger, Patro Teofilo Ohlmeier O. F. M., Wilhelm Solzbacher, Georg Wagner.

**Preskaŭ ĉiuj katolikaj jurnaloj kaj gazetoj** raportis pri la kongreso en Barcelona, kaj multaj ankaŭ publikigis ĝeneralajn artikolojn pri MOKA, pri Esperanto ktp.

La junulara gazeto « **Die Junge Schar** » (Würzburg) enhavos de januaro 1930 ĉiumonate Esperanto-parton gvidatan de Joseph kaj Wilhelm Solzbacher.

« **Die Jugendführung** », pedagogia organo de la katolikaj junulasocioj de Germanujo, ĉefe legata de la pastraj gvidantoj, represis el J. B. « La moralo de la rusa junularo » kaj « Katolika junularo en Ĥinujo », krome pli mallongajn tradukaĵojn el « Katolika Mondo ». Sekve de la kongreso en Barcelona ĝi publikigis sespaĝan artikolon de nia ĉefsekretario, montranta internaciajn taskojn kaj eblecojn.

« **Stimmen der Jugend** » (« Voĉoj de la Junularo ») nun estas la gvidanta organo de la katolika junularo el ĉiuj asocioj. Ĝi estas direktata de komitato de gvidantoj diversligaj. Kunredaktoro estas Wilhelm Solzbacher. « Stimmen » ofte jam atentigis pri MOKA kaj La Juna Batalanto, publikigis tradukojn kaj artikolojn el nia movado.

**Nia palestina sekretario** Maximinus Schmoller nun estas atingebla per jena adreso: Friedenswerk Marienau, Hoppstetten, Kr. Trier.

**Düsseldorf.** MOKA-grupo malfermis novajn **lingvokursojn** por Esperanto, angla kaj franca lingvoj. Metodo : gramofondiskoj Linguaphone. Gvidantoj : Heinz Kolvenbach kaj f-ino Wolff. 30 Partoprenantoj. — Okazis granda publika kunveno kun parolado de **Valentin Bulgakov**, lasta sekretario de Leo Tolstoj, pri « Tolstoj-Gandhi-Lenin », organizita per la lokaj grupoj de Mondjunularo Katolika, Socialista Laborista Junularo kaj Juda Junulara Asocio. Preskaŭ 300 ĉeestantoj. Paroladoj en lokaj unuiĝoj, parte kun lumbildoj.

**Essen.** En la katolika sekcio de **Popola Universitato** nova Esperanto-kurso de MOKA. gvid. Peter Klein, krome li gvidas du aliajn Esperanto-rondojn.

**Honnef.** Okaze de vizito de grupo da eksterlandaj geamikoj (anglaj kaj nederlandaj) gviditaj de nia Köln-a amiko Hans Wagner okazis junulara vespera soleno sub la ideo de la paco. La katolikaj gejunuloj de Honnef multnombre ĉeestis. Pastro Salget parolis pri niaj idealoj, kaj li povis konstati la ĝojigan fakton, ke el la multaj gejunuloj ĉeestantaj el Honnef kaj ĉirkaŭaĵo preskaŭ ĉiuj jam estis almenaŭ unufoje en eksterlando kaj ke la grupo ĉe enhavas seson da « mondvagantoj ». kiuj de Norvegujo ĝis Afriko tramigris la mondon. Li speciale montris la necesecon de profunde religia bazo en nia agado. Ankaŭ nia amiko pastro Leuchtenberg ĉeestis.

**Köln.** Esperanto-rondo de MOKA kunvenas ĉiun lundon, je la oka vespere, ĉe Pastro Blum, Gereonstr. 53. — «**Esperanto-Klubo** » en la Kolpinghaus (Katolika Junmetiista Unuiĝo) okazigis sukcesan varbekspozicion pri Esperanto. En la malferma soleno paroladis **Msgr. Theodor Hürth**, pastra ĉefprezidanto de la tutmonda Kolping-familio. Li esprimis la deziron, ke la Esperanto- movado bone progresu en la junmetiistaj unuiĝoj, por ke ankaŭ la Kolping-filoj en la diversaj landoj per Esperanto pli bone interkompreniĝu. Favoraj raportoj en la gazetaro. — De tempo al tempo MOKA kunvokas reprezentantojn de ĉiuj katolikaj junularaj ligoj en Köln por komuna diskutado de gravaj aferoj. Tiaj kunvenoj multe helpas nin. — Fine de septembro la vojaĝkaravano de la Belga Katolika Junulara Asocio survoje al Praha venis tra Köln, kaj niaj amikoj gvidis ilin tra la urbo. Oni ankaŭ vizitis la grandan centran Kolpingdomon, kie Monsinjoro Hürth mem gvidis la gastojn. — Komence de januaro laŭ invito de MOKA okazos en Köln paroladoj (parte kun lumbildoj) de **Pastro A. Boland** (Louvain), pastra gvidanto de la Katolika hina Junularo en Eŭropo, kaj de **Joseph Chen**, sekretario de tiu asocio. Se aliaj grupoj kaj lokoj ankaŭ deziras tian paroladon, ili skribu al Heinrich Grues, Köln-Mülheim, Bücherstube Hansahaus, Clevischer Ring, kiu preparas la kunvenojn. — 18 dec. parolado de W. Solzbacher : « La situacio de la paca movado ».

**Süchteln.** Meze de oktobro okazis kunveno de la « ekonomia gildo » en la Quickborn-ligo, kiu la kunlaboron en la MOKA-movado enmetis en sian regularon. La membroj de la Ekzekutiva Komitato de MOKA ĉeestis kaj samloke arangis sian monatan kunsidon. Carl Degen faris paroladon : « Mahatma Gandhi kaj ni ». Heinz Kolvenbach estis elmetinta sian bone aranĝitan pacan ekspozicion kun multaj propagandiloj de MOKA kaj faris gvidojn tra tiu ekspozicio kun klariganta parolado.

**Werl.** Sub gvido de August Günther denove formiĝis laborkomunumo de MOKA kun regulaj paroladoj. Unu el ili faris nia komitatano D-ro Fleischer el Karlsruhe.

**Hispanujo.**

**La gazetaro katolika** hispan- kaj katalunlingva detale raportis pri nia kongreso en Bacelona kaj ofte atentigis pri Esperanto, La Juna Batalanto ktp. Nia grupo « Esperantista Amikeco » en Barcelona preparas novan kurson.

**Hungarujo.**

**La nacia sekretario** Néméth Laszlo el Vac havis en Budapest mallongan interparoladon kun la internacia sekretario de MOKA pri la agado. Ni esperas, ke nia movado ankaŭ en Hungarujo prosperos.

**Katolikaj skoltoj** nun ŝatas lerni Esperanton, parte jam lernis ĝin antaŭ la Esperanto- kongreso. Nia amiko Patro Petro Olasz S. J. petas nin, publikigi jenon : « Se vi aŭ viaj Esperantistaj, amikoj vizitos Budapeston, la skoltoj de la trupo 327-a, nomita laŭ Sankta Ignacio de Loyola, volonte gvidos vin. Anoncu tiam vian alvenon aŭ loĝejon al ni : 327. Sz. Loyolai Szt. Ignac Cserkészcsapat, Budapest VIII., Horanszky-Utca 20. »

**Ĥinujo.**

**La nacia sekretariejo** daŭrigas sian admirinde fervoran agadon. Kiel Fr. Joh. Bapt. Kao sciigis nin, MOKA nun jam havas reprezentantojn en ses provincoj. — Multaj gazetoj ĥinaj skribis pri MOKA, Esperanto, La Juna Batalanto kaj la kongreso de Barcelona.

Nove konsakrita **misia episkopo** Monsgr. Jarre O. F. M. dum sia travojaĝo tra Köln havis unuhoran specialan interparoladon pri MOKA kun nia komitatanino Regina Reiff. Li promesis subteni nian movadon kaj esplori la ebiecon, enkonduki Esperanton en la misiajn lernejojn de sia eparkio (en provinco Shansi). Lia Episkopa Moŝto, kiu jam estis koninta antaŭe en Roma « Katolikan Mondon », ankaŭ donis bonajn praktikajn konsilojn por la MOKA-agado.

**Italujo.**

**Torino.** Nia amiko Giovanni **Saglietti,** Via Cuneo, 43, nun laboras por nia movado en grupo, kiun li jus fondis.

**Norvegujo.**

**Oslo.** Interesajn katolikajn informojn ni ricevos de nia delegito A. Björnstad.

**Peruo.**

**Lima.** Ildefonso Nunez, Casilla 202, de nun laboros kiel agento de MOKA kaj La Juna Batalanto.

**Rumanujo.**

**Tarcu-Mureŝ.** Nia delegito Karoly Vigh, farinte sian maturecan ekzamenon, iros de nun al la universitato de Cluj kaj tie komencos fervoran agadon por nia movado.

**Cluj.** 10. 10. 1929. Fondiĝis loka grupo de Mondjunularo Katolika : «Pax Christi» Ilenjo Zöld estis elektita kiel prez. kaj s-ino G. Bordeaux kiel vicprez. kaj muzikgvid. Sekr. estas Ilonja Szabo, kasisto Simon Csóra kaj bibl. Lili Baczoni kaj Hickel Maria.

13. 10. 1929. La societo « Pax Christi » aranĝis brile sukcesintan propagandan vesperon en la bele ornamita festĉambrego de la rom. kat. parohejo. La solenon malfermis knabina kanthoro per la « Himno ». Sekvis interesa parolado de S. Csora pri la historio de Esp. kaj UEA. Longa aplaŭdo Lili Baczoni arte deklamis poeziojn de J. Baghy kaj Ilonjo Szabo lerte rakontis spritajn anekdotojn. S-ino G. Bordeaux per rumanaj kaj hungara popolkantoj akompanite de gitaro ravis la aŭdantaron kiu plenplenigis la ĉambregon. F-ino G. Jakner rakontante bonhumoran historion rikoltis tondran aplaŭdon. Ilonja Zöld per varmaj vortoj dankis al s-ino Irma Gaspar kaj prelato J. Hirschler la bonvolan senpagan disponigon de l'kursejo kaj protektadon de l' grupo. Per viglajv Esp.-kantoj finiĝis la agrabla vespero.

Por demonstracii la riĉan Esp.-literaturon kaj gazetaeron f-ino Eugenia Morariu kaj s-ro S. Csora helpe de aro da novaj esperantistinoj kaj skoltoj aranĝis belan Esp.-ekspozicion. Loka gazetaro favore raportis (laŭ Heroldo de Esperanto).

**Svisujo.**

**Stans** (Nidw.) Nia delegito W. Flammer fondis MOKA-grupeton en la kolegio.

**Usono.**

**The Catholic Association for International Peace** (La Katolika Asocio por Internacia Paco), 1312, Massachusetts Ave., N. W., Washington D. C., kunlaboros kun ni.

**Urugvajo.**

**Montevideo.** Nia del. Romu'o Zeballos Morales bone helpas nin.

## LETERKESTO.

**Ĉi tiu numero** estas duobla numero, ĉefe tial, ĉar la dua kaj tria numeroj parte nur tre malfrue estas dissenditaj, kaj ĉar la redaktoro preskaŭ dronis en aliaj laboroj en la lasta tempo. Pardonon ! La sekvontan numeron vi havos tute ĝustatempe !

**La redaktoro** dankas la multajn geamikojn, kiuj helpis lin dum liaj lastaj vojaĝoj tra Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Italujo, Hispanujo, Francujo kaj Belgujo, kiuj lin gastigis, gvidis, informis kaj alimaniere subtenis. Tiaj praktikaj spertoj de la realeco de l'internacia frateco ĉiam donas novan kuraĝon kaj novan fervoron

**Al multaj skribintoj :** Pardonu, ke mi ne ĉiam povas tuj respondi.

**Vian adreson** bonvolu ĉiam noti sur viaj leteroj, poŝtkartoj, manuskriptoj ktp. Al kelkaj geamikoj mi volus skribi, sed nenie mi povas malkovri la adreson !

**Manuskriptoj** laŭeble estu maŝinskribitaj, nur sur unu flanko de la papero, kun interlinia spaco. Bonvolu ankaŭ zorge kontroli mem la gramatikan kaj stilan korektecon ! Vi ne scias, kiom da laboro vi faras al la redaktoro !

**Ĉu** vi ankaŭ ne forgesos, tuj sendi vian parton por la Jubilea Kolekto por La Juna Batalanto, anoncita en ĉi tiu numero ? W. S.